

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 7 fkoj
Bonfara : 12 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

JANUARO - FEBRUARO

1969 **1**

KULTURAJ KAJEROJ

1969 JANUARO-FEBRUARO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

Pri Gresillon

Esperanto tra la mondo — A. Frangeul

Ĉu vi konas Tiĉinon (II) — P. Métivier

Napoleono de la polico
Vidocq (II) — E. Motillon

Bildoj el Turkio

Ĉu nur fia besto ?
La Cikonio — M. Quayne (trad. S. G.)

Grandaj datrevenoj

Fantaziaĵoj
Diablo trompita de Virino — F. Rabelais (trad. Motillon)

La Perdrikoj — (J. Renard) (trad. J. Lenel)

Por via distro
Nia konkurso — P. Chevalier

Gramatiko per bonhumoro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

Pri Gresillon

Jam alvenas la aliĝoj al niaj diversaj studperiodoj, ĉefe por la venonta somero. Ni esperu, ke ilin sekvos multaj aliaj ĉar nia Domo bezonas ilin.

La seminario por grup- kaj kurs-gvidantoj de februaro okazos de la 23-a de februaro ĝis la 2-a de marto. Ĝi kunvenigos, krom kelkaj gvidantoj, plurajn infanojn, kio estas sukceso kaj pravigas la organizon de tiu periodo. Ni esperas, ke por la Paska periodo venos ankaŭ gejunuloj. Dum la unua periodo de Julio ni estas pretaj organizi specialan kurson por infanoj, ĉefe por tiuj kiuj partoprenos kongresojn, ekzemple la Infankongreseton de Helsinki. Samtempe la gesamideanoj, kiuj nur teorie konas la francan lingvon povos, en speciala kurso, pere de la esperanta ponto, riĉigi siajn praktikajn konojn de nia nacia lingvo. Ankaŭ okazos esperantaj kursoj.

Ni esperas, ke la gejunuloj vizitos la Kulturan Semajnon tiel multaj, kiel kutime, kvankam ĝi okazos en Julio anstataŭ Pasko. Ĝojigus nin, ke ankaŭ multaj eksterlandaj gejunuloj ĉeestu tiun periodon por ke ĝi fariĝu vera junulara renkonto.

Fine de Julio la partoprenantoj certe ŝatos la prelegojn de S-ro Major, el Nov-Zelando, kiu haltados en Gresillon du semajnojn okaze de ĉirkaŭmonda vojaĝo kaj parolos pri siaj spertoj pri lingvistiko, tekniko kaj... vojaĝoj. Aliaj prelegantoj prezentos diversajn, interesajn temojn.

La trisemajna aŭgusta periodo anonciĝas tre interesa. Jam dudeko da aliĝoj alvenis, kio promesas multnombran ĉeestantaron. Ni esperas, ke la nombro de Kapableculoj kaj Pedagogiuloj kreskos fine de tiu periodo kaj ke pluraj eksterlandanoj provos la Internacian Ateston pri Kapableco de la Esperantista Kulturdomo. Ĉiuj certe estos allogataj de la aliaj aktivaĵoj, ĉefe de la iniciado al foto-arto kaj al teatro.

En septembro la seminario por grup- kaj kurs-gvidantoj espereble interesos ĉiujn aktivulojn.

Ne plu atendu ; tuj rezervu vian ĉambron ; tuj petu informojn. Nur aliĝante nun vi estas certa havi la loĝadon kiun vi deziras.

Okaze de la SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO la « Hispana Esperanto-Muzeo », sekcio de la Hispana Esperanto-Instituto, kaj la Esperantista Kulturdomo decidis ĝemeliĝi (detaloj aperos en la venonta numero).

NE FORGESU

ke vi devas sendi vian reabonon aŭ abonon al via peranto aŭ al :

Pierre BABIN, 13, Bd de la Chauvinière
44 - NANTES, Francujo
pĉ Nantes 2 813 61

NE SENDU monon el eksterlando rekte al la supra adreso. Tio devigas nin al pliaj elspezoj. Sendu monon pere de la poŝtkonto. Dankon.

Esperanto tra la Mondo

Universala Kongreso en Helsinki. — La ekskurso al Laponujo estos 5-taga, de la 7-a ĝis la 11-a de aŭgusto. La oficiala postkongreso estos aranĝita en Turku de la 2-a ĝis la 6-a de aŭgusto kaj neoficiala ekskurso okazos en Leningrado de la 3-a ĝis la 6-a de aŭgusto.

Infana kongreseto okazos en la kadro de la kongreso en lernejo.

La dua oficiala bulteno aperis kun ĝeneralaj informoj, provizora programo kaj mendiloj por la disversaj ekskursoj.

Internacia Kongreso de S.A.T. — La 42-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazos de la 2-a ĝis la 8-a de aŭgusto en Novi Sad, Jugoslavio. Informoj kaj aliĝoj : Org. Kom., Pf 184, Novi Sad.

Komuna franca-germana kongreso. — Ĝi okazos de la 4-a ĝis la 8-a de aprilo en Strasburgo. Estas antaŭviditaj ekskursoj laŭ la Alsaca vinovojo al Haut-Konigsbourg kaj per ŝipo sur la Rejno. Postkongresa ekskurso al Norda Alsaco, Rastatt, Baden-Baden (tagmanĝo), tra la Nigra Arbaro al Oberkich, Kehl kaj Strasburgo. Skribu por informoj al : S-ro F. P. Knecht, 1, Résidence des Fleurs, 67 - Lingolsheim.

Restado en israela ripozejo. — Dekkvin tagoj (1-15 julio) sur la Verda Bordo apud Natanja, ĉe Mediteraneo kaj eventuala ekskurso tra tuta Israelo (16-22 julio). Informiĝu antaŭ la 31-a de marto, al Peltours, pf. 394, Tel Aviv aŭ al Esperanto-Ligo en Israelo pf. 1289, Tel Aviv.

El Ĉehoslovakio. — Nova grupoj de geaktoroj aperis ; ili estas membroj de la Silezia Teatro en urbo Opava kaj ili prezentis kun sukceso ; « Manon Lescaut » de la ĉeĥa moderna poeto Vitezslav Nezval, en traduko de Korinek. Tiu nova grupo aldoniĝas al la tri jam ekzistantaj : « Internacia Arta Teatro », « Bulgara Esperanto-Teatro » kaj « Teatro Populara » de Lodz.

El Ekstrem-Oriento. — Aktivuloj de la korea kaj japana movadoj renkontiĝis en Tokio kaj baldaŭ rekunvenos en Seulo. Plano por komunaj manifestacioj estis akceptita.

Eldonaĵoj. — « Jaroj sur tero », interesaj memoraĵoj de la konata hinda esperantisto L. Sinha.

— « Ellernu ! » reeldonaĵo de la fama progresiga kurso tute en esperanto de Ferenc Szilagyi.

— « Paŝoj al Plena Posedo », progresiga lernolibro de W. Auld en tridek « paŝoj » konsistantaj el legaĵoj kaj ekzercoj.

— Kompleta eldono de « La Nobla Korano » baldaŭ aperos, en Esperanto kaj paralele presitaj tekstoj esperanta kaj araba. La traduko estas verko de orientalisto erudicia, dro I. Chiussi. Ankaŭ kontribuis arabaj fakuloj kaj D-ro Waringhien. Verkis antaŭparolon Sir Muhammad Zafrullah Khan antaŭe prezidanto de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, kiu antaŭ nelonge komencis lerni la Internacian Lingvon.

— La Internacia Akademio de Turismo, patronata de Princo Rainier de Monako, post enketo pri la praktika aplikado de Esperanto en la monda turismo, decidis kompletigi sian Vortaron de Turismo per traduko en Esperanto.

Diversaĵoj. — La rilatoj inter Skolta Esperantista Ligo kaj la internacia skolta movado multe pliboniĝis.

Celante la Mondan Ĵamboreon, kiu okazos en Tokio en 1971, ĉiu esperantisto, ĉiu loka esperanto-societo estas invititaj donaci al la lokaj skoltaj grupoj unu ekzempleron de nova aperonta lernolibro. La donaco okazu, se eble, komence de septembro 1969. Pro helpo de oficiala instituto la prezo de la libro estos nur 2,50 ned. guld. Antaŭmendoj kaj antaŭpagoj al : J.K. Hammer, Taxusstr., Zaandam, Nederlando.

— Per nova dekreto de la konsilantaro por la nova liturgio, la internacia lingvo povas esti utiligita ankaŭ por la ĉiutaga parto de la meso kaj por la Kanono.

— Por enketo pri esperanto en lernejoj, la koncernataj instruistoj estas invitataj peti la necesan demandaron, se ili ne havas ĝin, al S-ro H. Sonnenberg, Echersfeldkamp 11, Dollbergen3161, Germanujo, por ke la statistiko de la farataj kursoj estu, kiel eble plej kompleta.


ĈU VI KONAS TIĈINON

(2a parto)

Ni staras ĉi-tie ĉe la plej malalta altitudo de la Svislanda teritorio nome : nur 200 m. super la marnivelo kaj tiu oazo-regiono estas ĉirkaŭata de ankoraŭ altaj montoj, kiuj je distanco de nur kelkaj kilometroj atingas 2.000 metrojn kaj eĉ pli ! Estas cirko, kies sola elirejo estas la lago mem, kiu direktiĝas suden al Italio. Tiu lago estas la plej profunda inter la Svisaj kaj Nord-Italaj lagoj kaj atingas 372 metrojn. Do, preskaŭ je 200 metroj sub la marnivelo troviĝas la fondo de la lago. Larĝa ĉirkaŭ 4 kilometrojn kaj longa 80 kilometrojn, ĝi estas potenca akvorezervujo, kiu efike reguligas la temperaturon de la regiono. Antaŭ ol reiri al la firma tero ni profitu la okazon ekskursi sur la lago. La rimedoj ne mankas kaj la intensa navigacio estas unu el la ĉefaj allogaĵoj por la turistoj. Grandaj pasaĝer-ŝipoj daŭre kunligas la vilaĝojn. La plej granda ŝipo nomata « ROMA » povas loĝigi 700 personojn... Flanke de tiuj pli-malpli grandaj pasaĝeraj ŝipoj kaj malĝrau la bedaŭrinda invado de bruemaj motoraj sportmaŝinoj, ankoraŭ ekzistas la trankvilaj barkoj de la vilaĝaj fiŝkaptistoj. Temas pri tipaj Tiĉinaj barketoj kun lignaj arkoj sur kiuj oni fiksas tendon por fari ombron. Ili estas vere pitoreskaj kaj oni vidas la saman tipon ankaŭ ĉe la lago de Lugano.

Unu el la plej belaj vilaĝoj ĉe la lago Maggiore, eĉ la plej bela inter ĉiuj, estas Ascona. Mi ne povas pri tiu loko silenti ĉar tie mi longe loĝis kaj ŝajnas al mi, ke tie mi travivis nur sunoplenajn momentojn. La vilaĝo pitoreska nestas inter la lago kaj la komenciĝanta monteto, kie oni konstruis dum la lastaj jardekoj centojn da individuaj domoj, vilaojn kaj multajn hotelojn, meze de mirinda naturo. Rapide disfamiĝis la beleco de tiu angulo kaj perdiĝis per la fiŝkaptista karaktero de la vilaĝo, sed restas tamen la rava panoramo.

La vilaĝo Ascona, pro sia raveco kaj pentrinda situo altiras milojn da turistoj ek de Pasko ĝis la fino de Septembro ; ĝia loĝantaro pli ol duobliĝas dum duono de la jaro pro la someraj restadejoj. Sekvo de tiu fremdula invado kuraĝigita de diversaj sepktakloj, kiel surlaga piroteknikaĵo, velboataj konkursoj kaj muzikaj koncertoj, la iama trankvila vilaĝo alprenis monduman vizaĝon. Tamen, feliĉe ankoraŭ manifestiĝas la trajtoj de la simpla, vivoĝoja kaj humora Tiĉina popolo. Bone konservata estas la tradicio de la fama Karnavala « rizotto » ; tiam la festa komitato de Ascona distribuas senkostan faman pladon da « rizotto » kuiritâ kun safrano, al la tuta loĝantaro ; estas aldonita laŭvole kolbaseto nomata « Luganika » (specialaĵo de la urbo Lugano). Tiu festo estas la plej agrabla kaj hejmeca el la tuta jarfestaro. Tio okazas sur la bela placo sub la platanoj ĉe la bordo de la lago. Kiel kutime la suno brilas ĉar en Ascona ĝi ne rajtas foresti. La preparoj estas iusence pli festaj ol la festotago mem. Dum la antaŭaj tagoj volontuloj (por tiu laboro ili ne mankas) iras tra la stratoj kun azeno kaj antikva veturileto por kolekti vinon. Ili alvokas per muziko kaj ĉiu eliras el sia domo por porti pokalon da vino, kiun oni verŝas en la barelon. Tiu vino estos por la Karnavala « rizotto » festo, la fama « millegusti » (milgustoj). La antaŭan tagon oni preparas la grandajn kuprajn kaldronojn sur la placo. Ligno estas alportita por la kuirado ; ĉio estas preta kaj matene de la festo jam tre frue la kuiristoj, blanke vestitaj, aktivigas la fajron, zorgas majstrece pri la kuirado. Baldaŭ sonoros tagmeze, jam svarmas la popolamaso. Ĉiuj domoj malpleniĝas de siaj loĝantoj, tamen la kripluloj retenitaj hejme ricevos sian porcion de la tradicia « rizotto » kiun oni ĝoje portos al ili. Oni alproksimiĝas al la distribuejo, oni mem prenas kartonan teleron, kiun oni avide prezentas al la ridetantaj kuiristoj, kiuj malavare servas ĉiujn. Oni klopodas por trovi sidlokon sur ŝtupo ĉe doma enirejo, ĉar la pitoreska fasado de la arkadaj domoj ĉe la fono de la placo proponas ŝirmatan pozicion por manĝi ekstere. La etoso estas senkompara ; en



tiu cirkonstanco ĉiuj koroj vibras unuanime ; momente ĉiuj klasaj afektaĵoj malaperas.

Poste okazos la kutimaj paradoj, tamburadoj, kaj dumnokta lasta festa spasmspirado ! Pli ol 2.000 porcioj da rizoto oni distribuis por agordi la korojn ; estis plia sukceso ; ni atendas esperĝoje la venontan jaron. Antaŭ ol esplori la ĉirkaŭantan teran teritorion por malkovri la veran personecon de la Tiĉina lando, ni restu momenton ĉe la lago. El ĉiuj flankoj ĝi altrudiĝas impone al la vido. Pitoreska strat-vojo ofte tranĉita en la abrupta roko ĝin sekvas, balkon-pozicie.

Post nur deko da kilometroj ni atingas la Italan landlimon. Kial ĉi-tie estas barilo ? Kial estas doganistoj ? La pejzaĝo estas ja tute simila, oni eĉ parolas la saman

lingvon ĉe la alia flanko de la barilo, en la provinco Novarra... La lago Maggiore ne finas sian ekziston pro tio, tute ne, ĉar la tri kvaronoj el sia longeco etendiĝas en Italio kaj ĉe la fino, la rivero Tiĉino, kiu eniris la lagon dum sia Svisa vivo, retrovos sian nomon en Sesto Calende kaj daŭrigos sian fluadon ĝis la riverego Pô. Krome, la komfortaj ŝipoj, spite al la artefarita landlimo, kondukas la turistojn de unu ekstrema punkto al la alia en la daŭro de 4 horoj.

Ne estas, laŭ mia gusto, pli agrabla promenado, meze de tiel bela pejzaĝo, sur lago kvazaŭ mare granda sed feliĉe sen mara skuo ! Tamen, kun la intenco limigi la rakonton al la Svisa Baseno, nomata ankaŭ VERBANO, ni vizitos, sur tiu lagoparto nur la insulon « Brissago » situanta je meza distanco de la bordoj inter ASCONA kaj la lasta Svisa vilaĝo « Brissago ». Tiu insulo, apud kiu troviĝas fakte alia tute malgranda insuleto, estas proksimume 3 hektara, kaj tiu tuta areo estas Botanika ĝardeno de la kantono Tiĉino. Ĝi entenas riĉan kolekton de subtropikaj plantoj kaj pro tio meritas viziton. Estas ja ĉiam aventuro migri al la insuloj ! Ĉu ne ?

La regiono ĝis nun prezentiĝis sub senmakula ĉielo blua ,ardegas la suno dum longa somero, frua printempo malavare disĵetas plej varian floraron, seka vintro daŭre mirigas per hela ĉielo kaj varmaj tagmezoj ; Aŭtuno, rapide pasanta, ravas per la kolorludoj de siaj kadukfoliaj arbaroj. Sed, notinde estas ankaŭ la furiozaĵoj de la kvazaŭ tropika karaktero ! Jes, ni devas tion konfesi : okazas foje en Tiĉino la plej teruraj fulmotondroj. Tio okazas precipe fine de Junio kaj ankaŭ en Oktobro. Tiu malbona vetero ĉiam venas el la Sudo, kaj koincidas kun sama veterserio ĉe la Mediteraneo. El super la lago (suda fenestro) alrulas ŝvebminace la nigraj nuboj, kiuj tondre eksplodas kontraŭ la montoj malantaŭe, norde. En la ĉielo infere krozadas la fulmaj sagoj, tiel ke la tuta paradiza lando subite aspektas, kiel baldaŭ malfermiĝanta tombo. Ĉu ni postvivos tiun kataklismon ? Komenciĝas diluve pluvi. Dum horoj, senĉese torente, malpleniĝas la senkompata nubaro. Se tio daŭras tro longe, la lago-nivelo altiĝas je pluraj metroj, superakvigas la grandan placon, kie oni devas boate veturi en Locarno same kiel en Venecio. Feliĉe, ĉio havas finon, kaj subite la suno reaperas pli forte ol antaŭe. Sur la kultur-kampoj la sabloza grundo ĉion sorbas rapide kaj same rapide oni forgesos la nigran momenton. La pluvotagoj estas malmultaj sed la pluvo kvanto estas tre grava. La jara mez-kvanto esta 1,80 m. kaj ofte pluvas dum unu tia fulmotondro ĝis 15 c.m. en unu tago. Tiuj veteraj kondiĉoj estas la feliĉo de la arbara vivo. En la parkoj, ĝardenoj pli malpli naturaj en la proksimaj montetaj ĉirkaŭaĵoj, amasiĝas folioj, dikiĝas humo-tavolo, kaj en varma malseka ombro milope naskiĝas palmoj, mimozoj, kamforarboj* ; kiel fortike kreskas tiuj kamforarboj centjaraj ! pli ol 30 metrojn altaj kun tiu brila foliaro. Renkontiĝas kutime en ĉiuj eĉ malgrandaj apuddomaj ĝardenoj figarboj, kies fruktoj tute normale maturiĝas plankreske, granatarboj kaki-arboj, jam renkontitaj en Bellinzona. Por dekoracia plezuro ankaŭ neniam mankas mimozo, kamelioj kaj azaleoj kiuj atingas tre respektindan staturon kaj estas la kulmino de la aprila florado. Ankaŭ oleandroj, bananujoj (Musa) kiuj sukcesas formi fruktaron (sed ne manĝeblaj ĉar tute ne maturaj) sed la plantoj facile atingas altecon de 4 metroj, kun belaj folioj 2 metrojn longaj.

Estas ankaŭ tre belaj specimenoj de ARAUCARIA imbricata, (nepenetrebla ĉiam verda arbo kun triangulaj pinte tranĉantaj folioj). Tute apud la lago preskaŭ neniam vere frostas kaj oranĝ-arboj povas vivi ekstere, sed ili restas malgrandaj. Krom tio, la regiono ŝajnas esti la renkontpunkto de la Mediteranea kreskaĵaro kun la norda centr-eŭropa ĉar same bone kreskas multaj specoj de koniferoj (abioj alpaj k.t.p. harmonie kunvivadas apud sudaj cipresoj kaj la antaŭnomitaj mediteraneaj arboj). Je tiu vidpunkto la regiono estas neelĉerpebla esplorkampo.

La kvar sezonoj, en tiu anguleto de la terglobo tiel favorata de la naturo, havas sian specialan ĉarmon kaj estas egale travivindaj ! Printempo, kiel en ĉiuj landoj de la mondo disŝutas florojn malavare. Somero donas la impreson travivi en ekzotika lando. Aŭtuno, pli saĝe ludas en la romantikaj arbaroj kun la nuancoj de l'ĉielarko kaj Vintro, laŭ ofta opinio, estas la majesta konkludo de la jara rondirado. Fakte, ĉu estas pli grandioza spektaklo ol vintra sunleviĝo, kiam gradon post grado lumiĝas la neĝkovritaj pintoj ? El malantaŭ la 2.000 m. alta kurteno aperas la unuaj sunradioj, kiuj preter la ronda valo frapas okcidenten same altajn montopintojn. Dum, en la fondo de la cirko ni apenaŭ vekiĝas en duonmallumo, jam je proksima distanco super niaj kapoj, ĉe la frostiga blanka dezerto arde ludas la fajraj lumoj de la suno.

Pli grandioza ankoraŭ estas la sunsubiro. Subite, pli frue ol kutime okazas sur ebena lando, la kosma kandelo malaperas siavice malantaŭ la okcidentaj montoj, kiuj matene rikoltis ĝiajn unuajn radiojn. Estas duona mallumo sed ne estas vera nokto. Ni rigardu orienten aŭ prefere iam norden ĉar en tiu sezono la ŝajna irado de la suno kovras malvastan sektoron. Jen la unuaj montopintoj flaviĝas, poste aliaj pli oriente alprenas ruĝajn, rozajn kolorojn. Estas neeble per vortoj priskribi tiun majestan spektaklon. Poste, ĉe la plej fora pinto montriĝas la lastaj violkoloraj lumradioj. Finfine, la neĝkovritaj montoj endormiĝas en serena nokto. La granda spektaklo daŭris pli ol 40 minutojn kaj tio ripetiĝas ĉiuvespere dum la vintro. Promenu ankaŭ sur la Placo en Ascona, aŭskultu la susuron de la ondomovoj kiuj respegulas zigzage la palan lumon de plena luno !

(daŭrigota)

P. METIVIER.

NE FORGESU niajn eldonaĵojn

Por la Praktikantoj de P. BABIN
(Pluaj paŝoj al vivanta lingvo) — Prezo : 8,50 f. f.

Naskiĝo de Esperanto - Domo
(La historio de Gresillon) — Prezo : 3,50 f. f.

Napoleono de la polico VIDOCQ (2a parto)

AŬSTRO, KOMERCISTO

Tie, li vivas kelkan tempon sub la aspekto de aùstra militkaptito. Tiuj soldatoj estis nombraj en Arras, kaj neniu rekonis lin. Post kelkaj semajnoj, li konatiĝas kun juna vidvino, kiu vendas merceraĵojn en malgranda butiko. Nova transformiĝo. Dum preskaŭ unu jaro, li estas honorinda komercisto, bone konata en la najbaraj foirejoj kaj vendoplacoj. Pro ies denunco, ĝendarmoj venas por lin aresti. Li sukcesas trompi ilin kaj eskapi. Haviginte al si pasporton laŭ la nomo de Blondel, li iras en Rouen kun la merceristino. Prospero kaj kvieteco revenas, sed estas baldaŭ rompitaj de Vidocq mem. Pro iu malfidelaĵo li forlasas ŝin. Li estas nun foira kolportisto. En la ĉirkaŭaĵoj de Parizo, li akiras sufiĉe gravan klientaron. Li eĉ instalas en Versailles butikon prizorgatan de lia vidviniĝinta patrino. Sinjoro Blondel estas konata komercisto, de ĉiuj estimata. Lia estonto povas estis nur feliĉa.

NOVA ARESTO, NOVA FUĜO

Ve ! fatalo ŝajne lin persekutas. Hazarde, ekskamarado rekonas lin, kaj por venĝi sin pri iama humiliĝo, li denuncas Vidocq'on. Malgraŭ lia tute regula pasporto, la polico certiĝas, ke li ne estas Blondel, sed la fuĝinta laborkondamnito Vidocq. Li estas arestita kaj sendita al la malliberejo de Douai. Dumvoje, li sukcesas sin kaŝi en veturilo de korpuso iranta al la fama tendaro de Bulonjo, starigita de Napoleono por invadi Anglujon. Tie, li povas eliri el sia kaŝejo nerimarkite.

KORSARO

Vidocq estas libera. Sendube, li povos facile sin kaŝi kaj trovi ian okupon en tiu amaso de ĉiulandaj soldatoj kaj de la multaj komercantoj, kiuj svarmas ĉirkaŭ la tendaro. Sed la afero ne montriĝas tiel facila, kiel li opiniis. Li ne trovas laboron. Senmona, elĉerpita, li malgaje vagas en la tendaro, kiam feliĉe, li renkontas unu el siaj junecaj kamaradoj de Arras. Tiu ĉi fariĝis, laŭ sia diro, rekrutisto por la ŝtata maristaro. Vidocq subskribas dungiĝon. Kompreneble, li alprenis novan identecon.

Li baldaŭ ekscias, ke li ne fariĝis ŝtata maristo, sed korsaro. La kapitano de la ŝipo estas unu el tiuj maristoj, kiuj ricevis de la registaro « markleterojn » rajtigantajn ilin kapti la komercajn ŝipojn de la malamikoj.

La nova ŝipano partoprenas kelkajn atakojn kontraŭ anglaj ŝipoj. La metio estas profitiga, ĉar li ricevas sian parton de la kaptaĵoj. Ĉi estas danĝera ankaŭ ; sed tio ne tro gravas por liaj aventuremo kaj kuraĝo. Sed la disciplino estas tro strikta por lia individuemo, kaj li sopiras al pli libera vivo.

Favora okazo sin prezentis. Dum ataka albordiĝo, unu el siaj kamaradoj, tre similanta al li, estis mortigita. Li prenas la paperojn de la mortinto, kaj dum halto en la haveno, li dizertas.

ARTILERIA KAPORALO

Efektive, li estas facile dungita en la mar-artilerio. Pro liaj sperto kaj bona konduto, li estas rapide promociita. La kaporalo Lebel povas esperi honorindan karieron. Vana espero ! Iu krimulo, kiun li konis en malliberejo denuncas lin. Nova aresto kaj enkarcerigo en la jam konata malliberejo de Douai.

Tie, okazas evento, kiu tre ĝojigas lin. Lia edzino decidis laŭleĝigi siajn rilatojn kun sia nuna amanto. Ŝi petis eksedziniĝon, sed por ties validigo, ŝi devas oficiale informigi sian nunan edzon.

Vidocq atendas la juĝon, kiu nepre sendigos lin denove en la punlaborejon. Post kvin monatoj, li sukcesas forkuri el la malliberejo, aŭdace plonĝante en la riveron Scarpe, kiu fluas ĉe la piedo de la konstruaĵo. Alivestita en oficira uniformo, li atingas Parizon.

TAJLORO

En tiu urbo, li trovas rifuĝon ĉe juvelisto de li konata. En najbara ĉambro, loĝas juna virino, Annette B. (pr.anet'). Amo rapide naskiĝas inter ili. Annette poste fariĝos por li fidela kaj valora helpanto.

Dum kelka tempo, Vidocq denove estas foira kolportisto. Poste, li aĉetas malgrandan butikon de tajloro. Lia negoco prosperas kaj havigas sufiĉe gravan enspezon. Post kelkaj monatoj, la nova komercisto akiris reputacion de honesta kaj fidinda homo.

Tiu feliĉa periodo ne daŭris eĉ tutan jaron. Iun tagon, du viroj vizitas la tajloron. Ili estas fuĝintoj el la punlaborejo de Brest. Ili postulas monon de sia eks-kunulo. Por eviti denuncon, Vidocq devas obei. Sed la du banditoj fariĝas pli postulemaj, kaj eĉ provas kompromiti lin. La ĉantaĝo fariĝas neelportebla kaj ne sendangera. Nepre li estos denuncita aŭ entirita en malbonan aferon. Malesperiga situacio ! La bildo de la punlaborejo aperas antaŭ la okuloj de Vidocq.

Longe pripensinte, li trovas nur du eblajn solvojn : fuĝi en alian urbon, aŭ dungiĝi en la polico. La unua solvo tute ne estas sekura ; ĉiam, li povos esti rekonita de liberigita aŭ fuĝinta krimulo ; sekvos neevitebla aresto kaj resendo al la punlaborejo. La dua solvo, kvankam eble malfacila ebligos indan vivon kaj signifos reintregiĝo en la societo.

Li decidas pri la dua solvo kaj klopodas por viziti la polican prefekton, S-ro Henry. Li konfesas al li sian situacion, kaj promesas rivelon pri serĉataj fuĝintaj kondamnitoj. Tiu provo malsukcesas.

Jen okazas tio, kion li timis. Ne povante kontentigi la postulojn de la du ĉantaĝistoj, li estas denuncita. Unu matenon, je sunleviĝo, frapoj al la magazeno vekas la « honorindan tajloron ». Policistoj venas por lin aresti. Helpate de Annette, li sukcesas sin kaŝi inter du matracoj, en ĉambro sur la kvara etaĝo. Ne trovite de la policistoj, li rifuĝas ĉe feltanisto. Parizo ne plus estas sekura por li. Li devas forkuri. Li do havigas al si falsan pasporton, sed ne havas tempon ĝin uzi. Li estas arestita post drameca persekuto sur la tegmentoj. Oni kondukas lin al Bicêtre, kie li atendos la proksiman « ĉenon » al Toulon.

Vidocq penas reagi kontraŭ la malbona sorto. Li skribas al S-ro Henry kaj denove proponas siajn servojn al la polico. Kiel rekompenco, li petas nur la favoron ne esti sendita al la punlaborejo.

Intertempe, S-ro Henry studis lian dosieron. Li tiel ekscias, ke Vidocq estis enkarcerigita nur pro militistaj deliktoj : sendisciplino, malobeo, dizerto. Malgravaĵoj laŭ la tiama kriminala vidpunkto. La akuzo pro « falsado de publikaj dokumentoj » pro kiu li estis kondamnita je ok jaroj da punlaboro forfalis, ĉar la akuzintoj, arestitaj pro aliaj krimoj, konfesis sian mensogon. La akuzo pri murdo ankaŭ estis pruvita erara. Li ja plurfoje sukcesis aŭdacajn

forfuĝojn. Sed neniel li povas esti konsiderata kiel ŝtelisto aŭ krimulo.

Cetere, la informoj, kiujn li donis, estis tiel precizaj kaj valoraj, ke la prefekto decidis lin liberigi kaj dungi en la polico.

POLICANO

Ekde la jaro 1809, Vidocq estas « sekreta agento » de la ŝtata polico, kaj povas repreni sian patran nomon.

Por ke la aliaj krimuloj ne povu suspekti tion, oni aranĝis ŝajnan forfuĝon. Ĉi okazis dum transigo al alia malliberejo. Kompreneble, ĝi plene sukcesis ; ĉiuj traserĉoj por lin retrovi estis vanaj. Tiu aŭdaca « fuĝo » plifortigis la admiron de la pariza krimularo kaj ties konfidon al li, konfido kiu estis lerte utiligata de la nova policisto.

La sekreta agento rapide montras sian kapablecon, aresŧas aŭ arestigas famajn banditojn de longe serĉataĵn. Kuraĝa, sentima, aŭdaca, havante sperton de tiu danĝera kaj stranga medio de ŝtelistoj, murdistoj kaj diboĉuloj, posedante eksterordinaran talenton por ŝanĝi sian aspekton, li povis penetri ĉien, kaj kapti konfidon de siaj estontaj viktimoj. Annette, je kiu li edziĝis estante malliberulo, estis valora helpanto al li. Ŝi ankaŭ scipovis tre lerte alivestiĝi, kaj kelkaj gravaj el liaj kaptoj estis ebligitaj de ŝi.

Kiel ĉiam, la sukceso naskis ĵaluzojn. Li devis sin gardi kontraŭ la perfidoj kaj kaptiloj de siaj kolegoj sekretaj agentoj, ankaŭ eks-kondamnitoj, ne tre ĝenataj de skrupuloj. Li sukcesis eskapi tiun « internan danĝeron », kiel li diris.

ŜTATA POLICESTRO, POLITIKA AGENTO

Pro liaj kapableco kaj lojaleco al siaj superuloj, li estis « leĝe pardonita » en la jaro 1818. Fine, li estis promociita al la oficiala regula polico. En 1832, li ricevis la altan postenon de estro de la tiel nomita « sekuriga polico ».

Rapide, liaj funkcioj transpasis la nuran protektadon de la havaĵoj kaj vivo de la Parizanoj. Oni konfidis al li por multe pli delikataj kaj sekretaj misioj. Li ĉiam energie neis, ke li okupiĝis pri politika polico. Tio estas vera parolante pri la interna politika polico, kiu zorgas pri la partioj kaj la kontraŭantoj al la registaro. Sed ĝi estas malvera koncerne la internaciajn rilatojn, Sendube, li estis tre agema kaj efika agento de la registaroj, kiujn li servis. Li reorganizis kaj perfektigis tiun « sekretan informadon » nun konatan de la publiko laŭ la nomo « kontraŭ-spionado ». Li havis korespondantojn en ĉiuj grandaj urboj francaj kaj eŭropaj, kaj amasigis gravan dokumentaron.

MALFAVORO

Vidocq estis fariĝinta grava persono, posedanta ŝtatajn eskretojn, tre bone informita pri la financistoj, industriistoj, politikistoj kiuj estis fakte la kaŝataj sed efektivaj regantoj. Vidocq havis realan potencon. Sed tiu potenco mem estis danĝera. Oni timis, ke lia ambicio instigos lin uzi siajn sekretajn informojn por persona profito kaj superregado. Tial, oni uzis pretekston de iu malbone sukcesinta polica afero, por devigi lin retiriĝi de la polico. Li proklamis, ke li memvole forlasis sian postenon. La vero estas, ke tiu « emeritiĝo » — laŭ lia propra esprimo — estis altrudita. Ĉi okazis en 1833, post dekkvin jaroj da polica estrado.

PRIVATA POLICISTO

Vidocq estis tiam 58-jara, sana, fortika, kaj tute ne ema pri senlabora ripozo. Tial, li fondis en Parizo, strato Vivienne, oficejon de privata polico. Tiel, li kreis novan socian funkcion, kiu multe disvolviĝis. En nia epoko, ĝiaj anoj titoligas sin : « privataj detektivoj », anglo-devena nomo (laŭ la verbo « to detect », eltrovi).

Liaj prospektoj kaj oficialaj paperoj estis titolitaj : « Vidocq, diplomito de la Reĝo ». Li povis havigi « ĉiajn diversajn informojn ». Oni povis eĉ aboni liajn servojn. Li promesis al siaj abonantoj « protekton kontraŭ ĉia komerca friponaĵo, kontraŭ ŝteloj aŭ ties efektoj », kaj eĉ « kontentigon de plej egaj postuloj ». Oni legis ankaŭ sur liaj aferleteroj tiun aserton : « Mi timas en mia kariero nek konkurencon, nek rivalecon ; ĉiuj, kiuj provis min imiti, malsukcesis ». Informpeta letero al unu urbestro finiĝas per tiuj vortoj :

« SE, sekve de mia antaŭa ofico kaj pro la vasteco de miaj nunaj interrilatoj, mi povas utili al vi por io ajn, vi povas disponi pri mi kaj kalkuli pri mia diligenteco kontentigi vin ».

Kiam li eksiĝis, Vidocq konservis por si la ĉefajn dokumentojn. Aresto, polica traserĉado ne ebligis trovi ilin. Li ja havis potencan memorkapablon, sed kredeble estas, li tiam kaŝis siajn dosierojn, kaj eble poste, detruis ilin. Neniam, ili estis retrovitaj.

Ŝajnas, ke ekzistis speco de neskribita kontrakto inter Vidocq kaj la tiamaj potenculoj. Silento de ambaŭ flankoj estis garantio de sekureco por ĉiuj.

Oni nenion scias pri la lastaj tagoj de Vidocq. Li mortis en 1858, estante 83-jara, ŝajne tute forgesita.

KIA HOMO LI ESTIS ?

Juĝi tian homon estas tute neeble. Lia tuta vivado estas kaŝita malantaŭ la sennombraj maskoj, kiujn li alprenis. Kvankam, oni ne povas akuzi lin pri krimoj, tre evidente li ne estis tre skrupulema. Li certe estis tre ambicia. En diversaj okazoj, ankaŭ en lia ofico de policestro, li montris veran lojalecon. Tamen, oni devas agnoski, ke lia tuta agado kiel policisto estis bazita sur trompo, perfido, denunco, aĉeto de konsciencoj.

Cetere, tre inteligenta, li tute reorganizis la policon ; kaj la franca « Sûreté », t.e. « sekuriga polico » fariĝis modelo por la aliaj eŭropaj ŝtatoj.

Li konfesis revoluciemajn ideojn laŭ tiu epoko, kiu estas ja unu el la plej konfuzaj kaj eble, el la plej koruptitaj de nia historio.

Li pretendis, ke la rolo de polico ne estas simple aresti kaj punigi krimulojn ; sed ke ĝia vera funkcio devus esti prevento de la krimoj, kaj certigo de la sekureco de la civitanoj. Li ankaŭ batalis por pli humana traktado de la arestitoj kaj kondamnitoj. Li asertis, ke multaj estas viktimoj de maljusta sociordo, kaj estas rebonigeblaj. Se tiam, liaj sugestoj estis malakceptitaj, ni povas konstati, ke liaj teorioj estas nun ĉe la bazo de la novaj tendencoj de la kriminala justico.

Vidocq estis ja homo eksterordinara, nekomprenebla, mistera, kredeble de neniu reale konata. Estas absolute neeble ĝuse kaj juste taksi la valoron kaj gravecon de lia agado en la societo de lia epoko ; tiam tiuj estis realaj En tiu 19a jarcento, tiom riĉa je grandaj homoj, li okupas elstaran apartan lokon, unika pro siaj strangeco kaj mistero. En li, bono kaj malbono interplektiĝis en neklarigebla konfuzo.


E. MOTILLON.

Bildoj el TURKIO

Kiam post kelkhora flugado vi alvenas en Istanbul nova mondo ekaperas.

Por multaj homoj, Istanbul estas la malnova ĉefurbo sur la bordo de Bosforo, kun multegaj moskeoj ĉiu pli bela ol la aliaj ; la Markoloj, la Ora Korno kantita de la poetoj ; la muregoj, kiuj ludis gravan rolon en la defendado de la urbo ; la Topkapi Serajlo popularigita de la kino, malnova imperiestra restadejo, nun muzeo riĉega je arĝentaj, oraj, jadaj kaj juvelaj trezoroj ; la Beylerbeyi Palaco, kie loĝis la franca imperiestrino Eŭgenia ; la Dolmabahce Palaco, kie Kemal Ataturk fondinto de la respubliko vivis siajn lastajn momentojn.






La turkaj kuiraĵoj estas bongustaj : farĉitaj melongenoj kaj vit-folioj, kradrostitaj fiŝoj, chich-kelab, kukoj kaj kompreneble la turka kafo. La vinoj de Anatolio estas tre agrablaj.

Tiu regiono senĉese mirigas la turistojn. Goremme kaj Urgup, en Kapadoco, prezentos siajn trogloditajn loĝejojn kie vivis la unuaj kristanoj, kaŝitaj en tiuj feinaj kamentuboj kaj kiuj ankoraŭ posedas belegajn freskojn. Apud Kaymakli kaj Derinkuglu la tero malfermiĝas por montri subterajn urbojn unikajn en la mondo : unu el ili povis akcepti 60 000 enloĝantojn sur sep etaĝoj !

Alia mirindaĵo : la termofonta stacio de Pamukhale (antaŭe Heliopolis), super la Kudruksu ebenaĵo. La karbonataj akvoj enversiĝas en vastan naĝejon ĵetkovritan de antikvaj kolon-fustoj el skulptita marmoro. Plie, ĉar la akvo estas troŝarĝita de kalkaj saloj, ĝi naskis la famajn travertinojn, kiuj kovras la monteton.

La plej bela parto de la Mediteranea bordo estas Antalya, fondita de Attale reĝo de Pergamo. Tie la antikvaj monumentoj sternas sian pompon en mirinda kadro sur la fono de la maro aŭ de la montaro.



ĈU NUR FIA BESTO ?

La Cikonio

Paroli pri cikonio antaŭ Franco estas tuj elvoki Alzacon kaj ĝian folkloron en kiu nia stilzobirdo tenas vere grandan lokon. Ĝenerale oni ignoras, ke tiu amo de la Alzacanoj al cikonio havas tre precizan originon. Ĝis la XV-a jarcento tiuj birdoj estis, en Oriento de Francujo, tiel malmulte ŝatataj ke monpremio estis pagata al tiuj, kiuj ilin murdis. Vokto Jean de Rubrempré estis, inter la masakristoj, la plej rezoluta kaj plej efikanta. Kiam, en batalo apud Nancy, li estis mortigita, oni rakontis, ke estis la cikonioj, kiuj tiamaniere revenĝis. Sufiĉis por ke cikonio iĝis birdo-fetiĉo de Alzaco.

Ĉu vere tiu birdo meritas nian kortuŝon — kiel montras la libroj de Erkmann-Chatrian ?

Jen sceno, kiu okazis en turka vilaĝo. Vircikonio reiras al sia nesto, kie lin atendas lia ino ; post kelkaj sekundoj la virbirdo ŝajnas ekkoleri ; ĝi taŭzas sian kompaninon kaj ekfluas al najbara nesto, kie li interblekas kun alia masklo. Ambaŭ maskloj revenas al la unua nesto kaj post mallonga kverelo kun la ino, ili sin ĵetas sur ŝin kaj per bekbatoj ŝin senintestigas. Observinte tiun tragedion, kamparano volis scii, kio estis. Li laŭgrimpas la tegmentojn, forigas la masklojn kaj ekzameninte la neston, li trovas : kokino- ovon ! Kompreneble, en tion kuŝas la enigmo ! La kamparano pluen enketas. Li malkovras, ke estas lia propra filo, kiu mem lokis, la kolino- ovon, en la cirkonio-neston. Li intencis vidi, kio okazos : li ne povis konjekti, ke tio okazigus iel pasian dramon (kondiĉe, ke ni konsentu, ke cikonioj rezonis kiel homoj) ; sed estas certe, ke ili rezonis kaj agis laŭ sia propra kodo. Sed vere, kion ni scias pri cikonio, pri ĝiaj moroj, pri ĝiaj kondutado, pri ĝiaj migradoj ?

Rekrutekzamenantaroj de kiuj netaŭgantoj estas tuj mortpafitaj : jen kio okazas ĉe la cikonioj ĵus antaŭ la aŭtunaj migradoj. La adoltuloj kunigas sur la kampoj severajn tribunalojn, kiuj revuas la junulojn tiun ĉi jaron naskiĝintajn kaj kandidatojn al la vojaĝo. Por la malfortuloj kaj malsanuloj : nenia kompato sed unu nura verdikto : la morto ! tuj iliaj juĝantoj masakras ilin per bekbatoj. Eĉ, oni asertas, ke cikonioj-gepatroj arogante al si — same kiel en la antikvaj civilizacioj — rajton de vivo kaj morto sur siaj idoj, kutime uzas leĝan murdon, celante rigoran selekton. D-ro G. Bouet, granda specialisto pri cikonioj iufoje vidis la jenon : cikoniopatrino kaptis, meze de siajn idoj — jam iom grandiĝinta — cirkoniidon, ne pli dikan ol kolombo, kaj per bekbatoj frakasis ĝian kranion. Alia eĉ sorbis sia hontaĵon, kio fakte estas drasta rimedo por ĝin malaperigi de antaŭ siaj ripročantaj samspeculoj.

Ĉu la cikonio, tiu brava birdo estus do fia besto ?

Vere estas, ke dum sia tuta vivo, ĝi mortigas, pro nutro-kutimo : al ĝi necesas bela freŝa viando : tiu de melolontoj lokustoj, ranoj, fiŝetoj, lacertoj, musoj, arvikoloj, kamporatoj, junaj ratoj, talpoj, ĉiaj serpentoj — ĝi aĉe voregas[e] !

Serioza observanto vidis jenon : cikoniido restas senmova preskaŭ unu horon, vertikale starigante sian longan rozan bekon el kiu eliĝas fiŝvoston ; tiu manĝegulo estis plenigante sin de la profundo de sia korpo ĝis la ekstremaĵo de sia beko kaj pacience atendas, ke la internaj digestadoj lasis liberan lokon.

La printemp — reveno, ĉe komenco de marto, alkondukas kun perfekta reguleco la cikoniojn en niajn regionojn. La vasta pendola movo, kiu-laŭlonge de la jaro — ilin balancas de unu hemisfero al la alia, ilin demetas sur ilian naskiĝolandon, por ke ili nasku novajn generaciojn.

Dank'al metalaj numeritaj ringoj — kiujn kuraĝaj specialistoj, helpe de multaj ŝtupetaroj — metas al tarsoj aŭ tibioj de la cikonioj ankoraŭ ne kapablaj flugi, oni pli kaj pli kontrolas iliajn translokadojn.

Poste oni povas ĉiu-jare kontroli la numerojn de la revenantaj birdoj. Tute ne facile : oni devas procedi de malproksime, per lorno ; tio postulas potencan instrumenton kaj malfacilan enfokusigon. Laŭ Alfred Schierer, alzaca naturalisto, legi tiun ringon povas necesi dek minutojn, okaze de speciala ŝanco, sed plej ofte dek horojn, dum kiuj oni estas ankiloziĝanta sur branĉo, aŭ ŝrumpiĝanta meze de ĉarpentaĵo en preĝeja turo.

Estas sub la signo « apartigo de la seksoj » ke la cikonioj vojaĝas al sia naskiĝolando.


Kontingentoj de Sinjoroj antaŭvenas, sekvataj, post kelkaj tagoj, de « Sinjorinoj solaj » arigitaj en kunularoj. Estas kiel furiero, ke S-ro Cikonio alvenas, nepre celante prepari loĝejon indan je la edzino, kiu baldaŭ falos al li el la ĉielo. La cikonioj estas malpli fidelaj al sia nesto ol oni povus supozi. Alfred Schierer notas, ke 60 % da ili venas duan fojon al la sama nesto[e] ; sed poste tiu procento ege malpliiĝas. En siaj junaj jaroj, la cikonioj sin lokas proksimume je 15-20 kilometroj de sia naskiĝoloko. En la sekvantaj jaroj la distanco iĝas pli kaj pli granda.

La nesto de la cikonio ne estas tiel ierte kaj delikate konstruita ol tiu de multaj aliaj birdoj ; ĝi konsistas el amaso de malsame grandaj branĉoj iel ajn arigitaj ; ĝia centra konko pleniĝas je plej stranga remburaĵo : seka herbo, gazono, plumoj, malnovaj paperoj, ĉifonoj, ŝiritaj virin-ŝtrumpoj, malnovaj kaskedoj kaj eĉ eluzitaj piedvestaĉoj ! Videble la cikonio vizitas publikajn rubujojn.

Tamen, starigita sur tegmentoj, kamenoj aŭ preĝejturoj la plej altaj la nesto havas noblan sintenadon ! La cikonio tute ne toleras najbarojn super si kaj volas sola superrigardi la pejzaĝon. Aliflanke homoj altiras ĝin kaj de alte ĝi interesiĝas je la homaj aktivaĵoj.


S. G.
(daŭrigota).

GRAVAJ DATREVENOJ



Antaù 75 jaroj mortis en Petersburgo.

Piotr Ilitch TCHAIKOVSKIJ. — Tiu rusa muzikisto kaj komponisto, rimarkinda melodiisto verkis multajn operojn kaj miksoperojn : Eùgeno Onegin, Mazeppa,... ; multŝatatajn simfoniojn : Patosan Simfonion : Manfred,... ; kaj la multkonatan baleton : la Dormanta Beiulino.



Antaù 80 jaroj mortis en Jena.

Carl ZEISS. — Tiu germana universitatano fondis en 1840 la plej grandan germanan entreprenon de optika kaj preciz-mekanika fabrikado. La disvolviĝo de la entrepreno komenciĝis en 1867, kiam Ernest Abbe kunlaboris. La entrepreno estas nun mondkonata.



Antaù 125 jaroj naskiĝis en Clausthal.

Robert KOCH. — Tiu germana kuracisto, kiu mortis en 1910, estas konata pro la malkovro de la tuberkulozbacilo al kiu oni donis lian nomon. Li inventis la tuberkulinon vakcin-limfon, kiu ne kuracas tuberkulozon sed ebligas la malkaŝon de la malsano. Li ankaù verkis etiologiajn studojn pri mikrobaj malsanoj.

FANTAZIAĴOJ

DIABLO TROMPITA DE VIRINO
(El « Pantagruel », libro kvara)
de François Rabelais

Dum sia marvojaĝo al la Orakolo de la dia Botelo, Pantagruel haltas en la insulo de la Papfigoj.

Nur por preni benitan akvon, kaj al Dio nin rekomendi, ni eniris en kapeleton apud la haveno.

Enirintaj en la kapelo, kaj prenantaj benitan akvon, ni ekvidis en la sanktakvujo viron vestitan per stoloj, kaj interne de l'akvo kaŝitan, kiel anaso plonĝanta, escepte iom el la nazo por spiri. Ĉirkaŭ li estis tri pastroj bone razitaj kaj tonsuritaj, legantaj la preĝlibron kaj ekzorcantaj la diablojn. Pantagruel trovis la aferon stranga, kaj demandinte kian ludon ili tie ludis, informiĝis ke, antaŭ tri jaroj, regis en la insula pesto tiom horora, ke duono kaj pli de la lando dezertiĝis, kaj la bienoj fariĝis sen posedantoj. Post finiĝo de la pesto, ĉi tiu viro sin kaŝanta en la sanktakvujo plugis kampon grandan kaj fruktodonan, kaj ĝin prisemis per greno, je la samaj tago kaj horo, kiam diableto (kiu ankoraŭ ne scipovis tondri kaj hajli, escepte nur sur petrosalon kaj brasikojn, ankaŭ ankoraŭ ne scipovis legi nek skribi) estis permesita de Lucifero veni en tiun insulon de la Papfigoj por sin distri kaj petoli ; ĉar tie la diabloj havis grandan familiarecon kun la viroj kaj virinoj, kaj ofte tie pasigis tempon.

Tiu diablo, alveninta en tiu loko, sin turnis al la plugisto, kaj demandis al li, kion li faras. La povrulo respondis al li, ke li prisemas tiun kampon por sin helpi al vivado sekvontan jaron. « Sed eĉ, diris la diablo, tiu kampo ne estas cia, ĝi estas mia, kaj al mi apartenas. Grenon semi tamen, ne estas mia profesio. Tial, mi lasas la kampon al ci, sed kondiĉe ke ni partigos la profiton ; — Mi konsentas, diris la plugisto. — Mi volas, diris la diablo, ke el la profito venonta, ni faru du partojn. Unu estos, kio kreskos sur la tero ; la alia, tio kio estos en la tero kaŝita. La elekton mi rajtas, ĉar mi estas diablo devenanta de nobla kaj antikva raso : ci estas nur malnobelo. Mi elektas tion, kio estos en la tero, ci havos la supraĵon. En kiu tempo estos la rikolto ? — Je duono de Julio, respondis la plugisto. — Nu, diris la diablo, mi ne mankos ĉeesti. Nur faru laŭ cia devo : laboru, malnobelo, laboru. »

La duono de Julio alveninte, la diablo denove sin prezentis sur la loko, akompanata de skadrono de diabletoj-akolitoj. Tie, renkontinte la plugiston, li diris : « Nu, malnobelo, kiel ci fartis depost mia foriro ? Tie ĉi konvenas fari nian partigon. — Tio, respondis la plugisto, estas justa. » Tiam, la plugisto kun siaj helpantoj, eksegis la grenon. La diabletoj, same, eltiris la stoplojn el la tero. La plugisto draŝis sian grenon sur la draŝejo, ĝin ventumis, ensakigis, portis al la vendoplaco por ĝin vendi. La diabletoj faris same, kaj sur la vendejo, apud la plugisto ili eksidis por siajn stoplojn vendi. La plugisto tre bone vendis sian grenon, kaj per la mono, plenigis malnovan duonboton, kiun li portis ĉe sia zono. La diabloj vendis nenion ; eĉ male, la kamparanoj meze de l' vendejo, ilin primokis.

Kiam estis finita la vendado, diris la diablo al la plugisto : « Malnobelo, ĉi-foje, ci trompis min, sed venontan fojon, ci ne trompos min. — Via diabla moŝto, respondis la plugisto, kiel mi estus trompinta vin, ĉar vi elektis unue ? Vere estas, ke per tiu elekto, vi opiniis trompi min, esperante ke, nenio el tero eliĝos por mia parto, kaj ke malsupre vi trovos la tutan grenon, kiun mi semis, kaj per ĝi tentos la homojn suferantajn, bigotajn aŭ avarajn, kaj per tento ilin faligos en viajn retojn. Sed vi estas tre nesperta en via metio. La greno, kiu estis en tero, mortis kaj putriĝis ; ties putriĝo naskis la alian grenon, kiun vi vidis ke mi vendis. Tiel vi elektis la plej malbonan. Pro tio, vi estas malbenita en la Evengelio — Ni forlasu tiun paroladon, diris la diablo. Per kio, ci povos ĉi jaron sekvontan prisemi nian kampon ? — Por profito, respondis la plugisto, laŭ bona mastrumado, konvenus ĝin prisemi per rapoj. — Nu, diris la diablo, ci estas bona malnobelo : semu multe da rapoj ; mi iin ŝirmos de ventego, kaj ne hajlos sur ilin. Sed, bone komprenu : mi postulas por mia parto tion, kio estos sur la tero, ci havos la malsupraĵon. Laboru, malnobelo, laboru. »

Alveninte tempo de rikolto, la diablo estis sur la loko kun skadrono de dom-diabletoj. Tie, renkontinte la plugiston kaj ties helpantojn, ili ekis segi kaj rikolti la rapfoliojn. Post ili, la plugisto fosis kaj eltiris la dikajn rapojn, kaj ilin metis en sakojn. Tiel, ĉiuj iris kune al la vendejo. La plugisto tre bone vendis siajn rapojn. La diablo vendis nenion. Eĉ pli malbone, oni lin publike primokis. « Mi ja vidas, diris do la diablo, ke mi estas trompita de ci. Mi volas fini la aferon pri la kampo inter ci kaj mi. Tio estos la pakto, ke ni intergratos unu la alian kaj, kiu el ni ambaŭ unue kapitulacos, forlasos sian parton de la kampo. Ĝi tute restos al la venkinto. La tago estos post semajno. Iru, malnobelo, mi cin diable gratos. »

La plugisto, reirante en sian domon, estis malgaja kaj pensema. Lia edzino, lin vidante tielan, kredis ke li estis ŝtelita sur la vendejo ? Sed aŭdante la kaŭzon de lia melankolio, ankaŭ vidante lian monujon plena de mono, milde lin konsolis, kaj certigis lin ke, pro tiu gratado, malbono nenia lin atingos. Nur li fidu kaj konfidu al ŝi. Ŝi jam estis pripensinta bonan rimedon. « Plej malbone, diris la plugisto, mi ricevos nur gratstrekon : mi kapitulacos je la unua grato, kaj forlasos la kampon al li. — Neniel, neniel, diris la maljunulino, fidu kaj konfidu al mi, lasu min agi. Vi diris al mi, ke li estas diableto : mi lin tuj kapitulacigos, kaj la kampo al ni restados. Se li estus granda diablo, estus dubeble. »

Estis la asignita tago, kiam ni alvenis en la insulon. Frue en la mateno, la plugisto tre bone konfesdonis, komuniiĝis, kiel bona katoliko ; kaj laŭ konsilo de la parohestro, plonĝe sin kaŝis en la sanktakvujo, tiel kiel ni lin trovis.

Dum oni rakontis al ni tiun historion, ni estis informitaj, ke la maljunulino trompis la diablon, kaj gajnis la kampon. Laŭ tiu maniero. La diablo venis al la pordo de la plugisto, kaj sonorigante, ekkriis : « Ho ! malnobelo, malnobelo, jen jen, per belaj ungegoj ! »

Kaj enirinte en la domon, fiera kaj tre memfida, ne trovinte la plugiston, ekvidis lian edzinon plorantan kaj lamentantan. « Kio estas ? demandis la diablo. Kie li estas ? Kion li faras ? — Ho ! diris la maljunulino, kie li estas, la malbonulo, la turmentisto, la rabisto ? Li min frenezigis, mi estas forperdita, mi mortas pro la vundo, kiun li faris al mi ! — Kiel ? diris la diablo, kio estas ? Mi lin tuj bategos. — Ha, diris la maljunulino, li diris al mi, la turmentisto, la tirano, la gratisto de diabloj, ke hodiaŭ li estas asignita por intergrati kun vi ; por provi siajn ungojn, li gratis min nur per la fingreto, tie inter la du kruroj, kaj min tute vundegis. Mi estas perdita, neniam mi resaniĝos, rigardu. Plie, li iris al la forĝisto por akrigi kaj pintigi siajn ungegojn. Vi estas perdita, Sinjoro diablo, amiko mia. Forkuru, li ne haltos. Foriru, mi vin petas ! »

Tiam, ŝi sin malkovris ĝis la mentono, laŭ la maniero per kiu la Persaj virinoj sin montris al siaj filoj fuĝantaj la batalon, kaj montris al li sian — kiel ĝi havas nomon — La diablo, vidante la grandegan kontinuorompon ĉiudimensian ekkriis : « Mahom ! Meĝera ! Alekto ! Persefona ! li min ne tenas ! Mi foriras plej rapide ! Nu, mi forlasas la kampon al li ! »

Ĉi malnova franca lingvo tradukis.

E. MOTILLON.

—o—o—o—o—

LA PERDRIKOJ

(el « Karotharulo » de J. Renard)

Kiel kutime, sinjoro Lepik malplenigas sian ĉasosakon sur la tablon. Ĝi entenas du perdrikojn. Frato Felikso enskribis ilin sur ardezon ĉe muro pendigitan. Ĝi estas funkcio lia. Ĉiu el la infanoj havas sian. Fratino Ernesta malplenigas kaj senplumigas la ĉasaĵon. Dum Karotharulon oni speciale komisiis al finmortigo de la vunditaj pecoj. Li ŝuldas tiun privilegion al la bonkonata malmoleco de sia seka koro.

La du perdrikoj agitiĝas, movas la kolon.

Sinjorino Lepik

— Kion vi atendas por ilin buĉi ?

Karotharulo

— Panjo, mi same bone ŝatus, miavice marki ilin sur la ardezon.

Sinjorino Lepik

— La ardezo pendas tro alte por vi.

Karotharulo

— Do, mi same bone ŝatus ilin senplumigi.

Sinjorino Lepik

— Tio ne estas porvira afero.

Karotharulo prenas ambaŭ perdrikojn. Oni kompleze donas al li la kutimajn indikojn :

— Premu ilin ĉi tie, vi ja scias, ĉe la kolo, kuspe. Tenante unu en ĉiu mano, li komencas.

Sinjorino Lepik

— Duope, belege !

Karotharulo

— Tiel daŭros pli mallonge.

Sinjorino Lepik

— Ne vin ŝajnigu do kormolule ; interne, vi frandas vian ĝojon.

La perdrikoj sin defendas konvulsie kaj svingante la flugilojn dissemas siajn plumojn. Neniam ili konsentos morti. Per unu mano, li pli facile strangolus kamaradon. Li metas ilin senmovige inter siajn genuojn kaj jen ruĝa, jen blanka, ŝvitanta, la kapo alta por nenion vidi, li pli forte premas.

Ili obstinas.

Koleregiĝante pro lia deziro ĉesigi tion, li kaptas ilin ĉe la piedoj kaj frapas iliajn kapojn kontraŭ sian ŝupinton.

— Ho ! la turmentisto ! ekkrias frato Felikso kaj fratino Ernesta.

— Fakte estas, ke li rafinas, diras sinjorino Lepik. La kompatindaj bestoj ! Mi ne volus esti sur ilia loko, inter liaj ungegoj.

Spite al sia longa ĉasista sperto, sinjoro Lepik eliras.

Jen ! diras Karotharulo, ĵetante la mortintajn perdrikojn sur la tablon.

Sinjorino Lepik ilin turnas, returnas.

El la frakasitaj kranietoj elfluas sango, iom da cerbaĵo.

— Urĝis forŝiri ilin de li, ŝi diras. Ĉu sufiĉe fušita ?

Frato Felikso diras :

— Pozitive estas, ke li ne sukcesis kiel antaŭe.

Tradukita de Jean LENEL.

POR VIAJ INFANOJ okazos speciala kurso komence de julio se estos sufiĉe da interesatoj. Tuj informiĝu !

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

(Vidu la regularon en la nº 5 Septembro-Oktobro 68)

Bonvolu sendi viajn respondojn antaŭ la fino de Marto al :

S-ro Pierre CHEVALIER
19, Boulevard Gabriel-Lauriol
44 - NANTES, France

—o—o—o—

UNUA PROBLEMO : (20 poentoj)

El la ĉisubaj frazoj, kelkaj estas korektaj, aliaj ne. Bonvolu korekti la erarojn. Estos kalkulitaj 2 poentoj por ĉiu eraro ĝuste korektita, sed estos forprenita 1 poento por ĉiu « nekorekta korektado ».

1) Li estas tiel kruela, kiom tigro.
2) Mi aĉetis dekduon de kuleroj, kaj du dekduojn de forkojn.
3) Mi volis ŝlosigi la pordon, sed mi perdis la ŝlosilon.
4) Mi tuj tagmanĝis, mi tuj iros al la laborejo.
5) La litero « j » estas la pli belsona en la alfabeto.
6) Eiffel turo estas tri cent metroj alta.
7) La birdo flugas super la domo.
8) Kien vi iras ? Ni iras en la ĝardeno.
9) En kiom de horoj konsistas unu tago.
10) Tiuj ĉi du amikoj promenas ĉiam duope.

DUA PROBLEMO : (20 poentoj)

Bonvolu anstataŭigi la punktojn per la taŭgaj vortoj en la ĉisuba rakonteto :

— Tre distriĝema ..... estis ..... invitita de ..... amiko por kartludo. La edzino, bone konanta la forgesemon de ..... edzo, diris al li :

— Memoru, mia kara : salutu ... mia nomo la mastrinon ! Donu trinkmonon al la servistino ! Kaj venu .... kun via ombrelo !

La sinjoro .... skribis .... en sian notlibreton, por ke li .... forgesu. Sed dum la vojo li ĉion konfuzas kaj poste salutis la ombrelon, donis trinkmonon al la ..... kaj revenis hejmen kun la servistino.

AMUZAJ PROBLEMOJ
(apartaj de la konkurso)

Solvoj de la lastaperintaj problemoj


La bona kalkulanto : la sumo de la ciferoj estas : 250 ; la nombro da nigraj punktoj estas : 150. Do, se vi trovis 400 vi estas ege bona kalkulanto.

Dedukto : A rezonis jene : « Se mi estus blanka, B scius, ke li estas blua, ĉar alikaze C vidus du blankajn krucojn kaj elirus ; same C scius, ke li estas blua, ĉar alikaze B elirus. Nek C, nek B moviĝas, do mi certe estas blua. »

NOVAJ PROBLEMOJ

La farmistoj : Tri farmistoj iras al la foiro kun siaj edzinoj. La nomoj de la farmistoj estas : Johano, Alberto kaj Georgo. La nomoj de la edzinoj (ne necese laŭ la sama ordo) estas : Maria, Johanino kaj Elizabeta. La nombro da porkoj aĉetitaj de Alberto estas dufoje pli granda ol la nombro da anasoj aĉetitaj de la edzino de Johano ; la nombro da tiuj anasoj estas dufoje pli granda ol la nombro da porkoj aĉetitaj de la edzo de Johanino ; la nombro da anseroj aĉetitaj de Johanino estas dufoje pli granda ol tiu da anseroj aĉetitaj de Elizabeta ; la nombro da anseroj aĉetitaj de Elizabeta estas dufoje pli granda ol tiu da porkoj aĉetitaj de Alberto ; la nombro da anasoj aĉetitaj de la edzino de Johano estas dufoje pli granda ol tiu da anseroj aĉetitaj de la edzino de Alberto. Kiu estas la nomo de la edzino de ĉiu farmisto ?

En la fundo de la maro : Se vi atente rigardas tiujn du bildojn vi trovos dek erarojn. Kiu trovos ilin ?



GRAMATIKO PER BONHUMORO

« ANKAŬ devas ĉiam esti metata senpere antaŭ la vorto kiun oni volas emfazi » (Plena Vortaro).



— Kial vi opinias, ke ankaŭ via filo estos pentristo ?



— Li altiĝis kaj ankaŭ obeemiĝis ; li nun insistas por mem sin bani.



— Ĉu vi opinias, ke ankaŭ dum la vintro ni devas dormi kun malfermita fenestro.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (39 aŭst. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (70 fr.).

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH BA2 5Rx (12 ŝil).

Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (1,50 us. dol.).

Finnlando : S-ro Joel Vilkki, SOMERO 9 - Pĉk : Tu 60253 (7 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (5,6 mk.).

Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1°, la, BARCELONO 90 pes.).

Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (840 lir.).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (540 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1260 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (5 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN.

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (50 zl.).

Rumanio : S-ro Adrian Boldan, p.k. 1412, BUKUREŜTI - 6.

Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk. 157007 (8,4 kr.).

Svislando : S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (7 sv. fr.).

Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (1,50 us. dol.).

Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (1,50 dol.).

Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis **septembro ĉiulandajn esperantistojn** kaj eventuale iam ajn **karavanojn** frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier Le Gérant : P. BABIN.

Supplément au n° 1 de 1969, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Que sera la saison 1969 ? Il est bien difficile de le dire. Le nombre des inscriptions reçues jusqu'à ce jour est encourageant. L'un des deux stages de février aura lieu. Une rencontre de Sociétés Coopératives se tiendra au château en mars. L'année commence donc sous de bons auspices. Mais l'augmentation des prix de séjours décidée en octobre risque d'être en partie absorbée par l'augmentation du coût de la vie. Seul le nombre des participants pourra faire de cette année 69 une bonne année. C'est pourquoi nous faisons appel à tous nos amis pour qu'ils viennent nombreux et fassent autour d'eux de la propagande. Bien sûr, l'étang de Grésillon n'a pas l'azur de la mer Méditerranée ; la baignade n'a pas les dimensions de l'océan, la table de Grésillon ne peut pas vous offrir des plateaux de fruits de mer, des langoustes ou des tournedos sauce béarnaise. Mais avouez, vous qui connaissez Grésillon, que nulle part ailleurs vous ne pouvez trouver cette atmosphère proprement espérantiste, cette possibilité d'enrichir vos connaissances sans être à l'école, ces rencontres très agréables que l'on y fait.

Nos nouveaux jardiniers sont en place depuis décembre. Beaucoup de travail a été fait dans la propriété. Celle-ci y gagnera certainement et la Maison du même coup. La cuisinière semble pleine de bonne volonté. Nous la verrons bientôt à l'œuvre. Elle devrait pouvoir faire son travail correctement. En juillet et août nous aurons un cuisinier de métier, solution souhaitable lorsque le nombre de participants est important.

Nous espérons faire bénéficier les staglaires d'une attraction nouvelle en été. Si le temps et les moyens matériels le permettent un mini-golf sera construit derrière le terrain de volley-ball sur les plans établis par MM. Ciret père et fils. Il nous faudra peut-être de la main d'œuvre. Nous ferons un appel en temps voulu.

Tout est en place pour que 1969 soit une année digne des succès passés. L'avenir ne nous appartient pas complètement. Il sera ce que vous tous nous aiderez à le faire.

P. BABIN.

A partir de mars le train ne passera plus à Baugé. Un service de car assurera le service de La Flèche à Baugé. Il existe également des services réguliers Tours-Baugé et Angers-Baugé. Nous tenons les horaires à la disposition des intéressés.

NOTRE REVUE

Très nombreux sont ceux d'entre vous qui ont déjà réglé leur abonnement. Le nombre des abonnements bienfaiteurs est important. La hausse des tarifs d'impression nous fait désirer que la majorité d'entre vous comprenne que le geste que vous ferez nous aidera énormément. Des amis ont fait de la propagande et déjà de nouveaux amis se sont abonnés. D'autres doivent suivre leur exemple. D'avance, merci.

ABONNÉS BIENFAITEURS 68

Liste N° 8

M. Roger Bernard (92)	15 F.
M. Epstein (39)	12 F.
Mlle Lévy (83)	12 F.
M. Jouis (76)	12 F.

EXAMENS

Voici la liste des « élèves » de Grésillon reçus aux divers examens en août et septembre :

Atesto pri Lernado : Barroux Simonne, Bony Jeanine, Bourdeaux Jean-François, Sœur Claire Joseph, Dorge Myriam, Dubuisson Maurice, Dumont Chantal, Langronnier Charles, Martins Claude, Rabin Colette, Wodarczyk Claude.

Atesto pri Supera Lernado : Babin Pascale, Bony Jeanine, Dumont Chantal, Roussel Jeanine, Vergnac Dolorès.

Atesto pri Kapableco : Lloancy Robert, Tomasella Yves.

A tous, nos tardifs mais sincères compliments.

ABONNÉS BIENFAITEURS 1969

Liste N° 3

M. Debertonne (78)	20,00	M. Antoni (83)	12,00	M. Chevalier (44)	12,00
M. Santamaria (13)	12,00	M. Poulain (62)	12,00	Mme Bavay Gilliard (59)	12,00
M. Jullien (13)	12,00	Mlles Vazon (79)	24,00	M. J. Micard (14)	12,00
M. Raynaud (30)	12,00	M. Chatelain (14)	12,00	Mlle Louys (25)	12,00
M. Kastytis (U.R.S.S.)	12,00	M. Jacquesson (86)	20,00	M. Nevoux (94)	12,00
M. R. Bernard (92)	15,00	M. Aude (37)	12,00	M. Bourdelon (13)	12,00
Mme Texier (44)	12,00	Mme Roussel (76)	12,00	M. Guarrigue (13)	12,00
M. Turin (25)	12,00	M. Thierry (75)	12,00	M. Deyrolles (13)	12,00
S-ro Habermehl (67)	15,50	M. Lherbier (72)	12,00	M. Martinez (13)	12,00
Centre Esp. (13)	12,00	M. et Mme Guillot (74)	24,00	Mlle Beauvais (60)	12,00
Mme Vaatanen (13)	12,00	M. Beau (13)	12,00	Doktoro Nagy (Budapest)	12,00
M. Mathis (83)	12,00	Mlle Bariteaud (06)	12,00	M. Heendrickxen (44)	12,00
M. Salasc (34)	12,00	M. Cadenel (13)	12,00	M. Benistant (72)	12,00
Mme Villette (49)	12,00	M. Beliard (44)	12,00	M. Fauvel (22)	12,00
Mme Cantel (17)	12,00	M. Chasseriaud (17)	12,00	M. Pons (09)	12,00
M. Guillou (22)	12,00	M. Barré (44)	12,00	M. Broise (27)	12,00
Mlle Tuslane (49)	12,00	M. Lenel (22)	12,00	M. Berret (13)	12,00
Mme Martin (79)	12,00	M. Pallard (72)	12,00	M. Carlué (13)	12,00
M. Guibert (63)	12,00	M. Lefebvre (72)	12,00	M. Reymond (13)	12,00
Mlle Laporte (25)	12,00	M. Schrapp (Al. Féd.)	12,00	Mme Jurquet (13)	12,00
M. A. Merdrignac (78)	12,00	Mlle Chérault (78)	12,00	Mme Villanova (13)	12,00
M. Laforest (71)	12,00	Mme Beron (13)	12,00	M. Hubert (49)	12,00
M. Genuit (10)	12,00	Foyer cult. esp. (13)	12,00	Mme Marbœuf (49)	12,00
M. Vayssières (77)	12,00	M. Leoni (13)	12,00	Mme Lemonnier (92)	12,00
M. Boulogne (13)	12,00	M. Cavelan (06)	12,00	Mlle Carré (69)	12,00
M. Boyet (49)	12,00	Mlle Ménard (49)	12,00	Mlle B. Desnos (75)	12,00
M. Nouveaux (38)	12,00	M. Poly (75)	12,00	Mme Lacroix (35)	12,00
M. Cambillard (75)	20,00	M. Métivier (49)	12,00	Mme Villemin (30)	12,00
M. Canet (89)	12,00	Mlle Berthelot (44)	12,00	M. et Mme Prévost (44)	24,00
M. Duflot (59)	12,00	M. Curnier (24)	12,00	M. Tragin (27)	12,00
Mlle Raulet (44)	12,00	Mme Claude (35)	15,00	M. Bouquin (59)	12,00
Sino Sudec (Al. Féd.)	12,00	M. Couraud (16)	12,00	M. Esteban (83)	12,00
Mlle Maginot (93)	12,00	M. Brousse (75)	12,00	M. Moulin (92)	12,00
Mlle Chérie (14)	12,00	M. Ringotte (59)	12,00	Mlle M. Desnos (72)	12,00
Mme Lucas (76)	12,00	M. Kraemer (78)	15,00	M. R. Martin (35)	12,00
M. Robert (95)	12,00	Mlle Pinel (75)	15,00	Mme Grisier (03)	12,00
Mme Micard (53)	12,00	M. Lanz (93)	12,00	M. Laurent (16)	12,00
Mlle Claitte (69)	12,00	M. Martin C. (35)	12,00	M. Hénaux (92)	15,00
M. Coussé (72)	12,00	Mme Reyneau (49)	12,00	Mlle Dardarin (79)	12,00

Total : 1.462,50

NOS PEINES

Nous avons appris trop tard pour en faire part dans le dernier numéro de la revue, le décès de Oskar Peters, membre de la M.C.E. Que tous ses amis de Hambourg trouvent ici l'expression de notre sympathie.

Un autre ami de longue date, également membre de la M.C.E. est décédé en janvier. Il s'agit de Maurice Fabert de Chelles (77). Nous présentons à Mme Fabert et à ses enfants nos bien sincères condoléances.

PHILATELISTES

Nous tenons à votre disposition des timbres neufs de Pologne, Roumanie, Tchécoslovaquie, U.R.S.S. Nous les vendons, **au profit de la M.C.E.,** à 50 % du prix du catalogue Yvert. Envoyez : 5, 10, 20 francs à :

Sro Giloteaux, 3, allée Béranger, 59 - CROIX

C.C.P. Lille 2 269 89

NOS SÉJOURS

PAQUES : 6 avril - 12 avril

Cours d'Espéranto par la méthode directe

COURS PRATIQUE

Sous la direction de M. BOYET
directeur de l'Ecole Normale d'Instituteurs d'Angers

ETE : 29 juin - 13 juillet

Cours de Français usuel par l'Espéranto

à l'usage de nos amis étrangers
COURS D'ESPERANTO
sous la direction de M. RIBOT

13 juillet - 20 juillet

8e semaine culturelle

organisée par U.F.E. sous la direction de M. BOYET, Président du G.E.E.

20 juillet - 3 août

Vacances internationales culturelles et espérantistes

Conférences par M. MAJOR, Professeur de langues
agrégé de l'Université de Nouvelle Zélande

« De Novzelando al Japanujo kaj tra Azio al Gresillon »
« Nutrado de eksplodanta monda popolo »
« La japana Oomoto kaj la Esp-movado »
« Neologismoj »
« Novzelando »

D'autres conférenciers connus participeront à cette période.

3 août - 24 août

Semaines espérantistes et culturelles

Cours d'Eperanto — débutants : M. LE MAGADURE
pratique : M. BABIN
supérieur : M. THIERRY
(Préparation au Pedagogia Atesto)

Cours de vannerie, reliure, photo. — Initiation au théâtre.

24 août - 7 septembre

Cours d'espéranto (*M. Ribot*)

Stage de formation de responsables de cours et de groupes
organisé par U. F. E. et dirigé par M. BOYET

EXCURSIONS :

Châteaux de La Loire — Angers — Le Mans — Nantes — La Flèche

Une de ces périodes vous convient certainement. Diffusez ce programme. Nous tenons à votre disposition pour vos amis, des programmes en français et en esperanto.

Informez-vous à : **M.C.E., Grésillon, — 49 - BAUGÉ**

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie.

Adresser commandes et chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
49 - Baugé
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de **5 Fr.**

Le catalogue a paru dans le dernier numéro. Un autre exemplaire peut vous être envoyé sur demande.

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon : noires :	0,40 F.
couleur :	0,50 F.
Cuillères de collection : 9,00 et	12,00 F.
Pendentifs :	7,00 F.
Disques de stationnement :	2,00 F.
Etoiles pour vitres de voitures :	1,00 F.
Disque 30 cm avec chansons de Bob Dylan interprétées par le Duo Espera :	25,00 F.

et :

Les Héros Existentialistes

(texte français-esperanto)

de Colette Llech-Walter : 3,00 F.

(plus frais d'envoi pour commande au-dessous de 5,00 F.).

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ

de **P. Babin**

Prix : **8,50 F.**

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

